

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №11



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2017. №11 (277)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajjevo, Sergio Pokrovskij, Alexander Shlafer, Andrzej Sochacki

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 68-69.

Abontarifo por 2018

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 750 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto «avko-u» ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2017, №11 (277).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 1 ноября 2017 г.

Bazaj informoj pri La Ondo de Esperanto.....	2
En ĉi tiu numero	3

Temo5

Nekredeble, kiom da tempo ni elspezas pro polemikoj!: Veronika Poór respondas	6
---	---

Eventoj10

Renato Corsetti. Ĉu pli gravas la dua aŭ la unua kongresa parolado de Zamenhof? Pri Itala Esperanto-Federacio kaj la homaj rajtoj	11
Zsófia Kóródy. La Esperanto-urbo daŭre vigla	13
Stefano Keller. La arkivejo CDELI estas 60-jara	15
Katerina Arbekova. Novosibirsko: La dua Lingva Festivalo	18
Irina Gonĉarova. LF en Ĉeboksaro: Malpli amasa ol antaŭe.....	19
Irina Gonĉarova. La Moskva Festivalo invitas por la 12a fojo.....	20
Alfons Tur. 38a Kataluna Esperanto-Kongreso	21
Wally du Temple. Esperanto en Kaskadio	22
Ángel Arquillos. Internacia Semajno ĉe la maro	23
Małgosia Komarnicka. MFS: Esperanto prezentita en Vroclavo	24
Peter Baláž. Pri Esperanto kaj lingva imperiismo en Slovakio	25
Nina Pietuchowska. Prepari Esperanto-instruistojn kun subteno de EU.....	26
Subteneblo por partopreni la UKon en Lisbono	26
La 103a UK: "Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?".....	27
ENa – plenrajta membro de Internacia Naturamikaro	28
Miroslav Malovec. Konferenco de ĈEA	29
Libuše Dvořáková. Internacia Renkontiĝo en Svitavy	30
Naga Siva Kumar Kotha. La kvaran fojon en Suda Azio.....	31
Vjekoslav Morankić. 110a datreveno en Rijeka	32
Nekrologoj	34
Koncize (11 informoj)	35

Tribuno36

Peter Baláž. Scratch – programista platformo (ne nur) por infanoj	37
Humphrey Tonkin. ESF bezonas vian subtenon.....	38
Radojica Petrović. ILEI: Konkurso pri kongresa emblemo.....	39
Esperanta Civito en Afriko: Polemiko daŭras (Giorgio Sifer, Chamberline Nguéfac)	40

Arkivo41

Roman Dobrzyński. La romano pri Romano	42
--	----

Jubileoj kaj memordatoj en novembro 201748

Kulturo49

Ambrose Bierce. Okazaĵo ĉe la ponto super la rivereto Strigo (Trad. Russ Williams) ... 50

Wolfgang Kirschstein. Artisto en ŝanĝiganta mondo.....57

Alfons Tur. (Preskaŭ) Monda premiero de *Incubus*58

Ilona Koutny. Interesa kaj leginda kolekto (Recenzo: *Interlingvo inter lingvoj*).....59

Lingvistoj tamen interesiĝas pri esperanto.....60

Flo! *Planedo nia*: Duobla albumo de *Vojaĝo*61

Biblioteka Apogo Bachrich subvencias ok bibliotekojn62

Literatura Foiro, 2017, №28863

Ricevitaj gazetoj63

Halina Gorecka. Literatura konkurso *Liro-2017*.....64

Mozaiko65

Sep enigmoj.....66

Pri lernejoj, instruistoj, lernantoj kaj gepatroj (Trad. Kukucapa Nemoskovskaja).....66

István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj.....67

Kiel aboni *La Ondon*.....68

Aŭtuno venis al nia regiono. La kovropaĝo montras, kia estas la Ora Aŭtuno en Svetlogorsk-Rauschen, je 30 verstoj norde de Kaliningrado... Sed aŭtuno estas ankaŭ sezono de abonkampanjoj. Ni esperas, ke vi ŝatas la unuan virtualan jaron de *La Ondo de Esperanto* kaj ke vi pretas ankaŭ en 2018 esti kun ni.

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



Ĉi tiu intervjuo estis planita por la oktobra *Ondo*, sed pro la enorma okupateco de la Ĝenerala Direktoro, ŝi sukcesis respondi la demandojn nur fine de oktobro. La 1an de novembro, kiam ĉi tiu numero estis jam preta, la Estraro de UEA decidis, ke Veronika Poór transdonos sian postenon la 1an de januaro 2018 al Martin Schäffer. (Foto: Chuck Smith)

Nekredeble, kiom da tempo ni elspezas pro polemikoj!

Veronika Poór respondas

Jam dum unu jaro kaj duono vi laboras en Roterdamo kiel Ĝenerala Direktoro de UEA. Ĉu la direktorŝanĝo okazis glate?

Bedaŭrinde ĝi ne okazis tiel glate kiel oni povus esperi, pro neantaŭvideblaj kaŭzoj. Kelkajn tagojn post mia alveno la tiama ĜD serioze malsaniĝis, kio evidente malhelpis la transdonon de konoj kaj spertoj. Poste, en junio, alia sperta oficisto devis preni sanforpermeson, kio neatendite plilongiĝis, tiel ke ĝi daŭras ankoraŭ hodiaŭ. Feliĉe miaj kolegoj en kaj ekster la oficejo multe helpis pri la transiro, sed ĝi certe estus povinta okazi pli facile.

Ĉu en via laboro vi frontis problemojn, kiujn vi ne antaŭvidis, kandidatigante por la direktoreco? Se jes, kiujn?

Jes, certe! Kiam mi kandidatiĝis, mi pensis, ke la planita transdonto estas tro mallonga, kaj ni devas fari kion ni povas por laŭeble longigi ĝin. Mi ne antaŭvidis tian mallongiĝon, kiel ĝi okazis en la realo.

En la Centra Oficejo (CO), krom la oficistoj de UEA, laborantaj sub via gvido, deĵoras ankaŭ volontuloj de UEA kaj TEJO – pli multaj ol antaŭe. Kiomgrade tiu “invado de volontuloj” (mal)helpas la rutinan oficejan laboron.

La rapida kresko de la nombro de la volontuloj estas signifa ŝanĝo en la vivo de la oficejo kaj kompreneble tio povas naski streĉojn. Responde al via demando, la rilato inter helpo kaj perturbo forte dependas de la personoj, situacioj mem – ankaŭ tial tre gravas atenti la oficejan vidpunkton antaŭ la elektado de la volontuloj. Parenteze, por eviti eventualajn miskomprenojn, indas noti, ke ne ĉiuj volontuloj venis laŭ mia invito.

Malgraŭ ke la invitado estas relative nova, jam montriĝas pozitivaj efikoj de

la volontuladoj en la CO, por prezenti nur kelkajn el ili: la eldono de la *Unesko-Kuriero*, la arta ekspozicio parte pri Esperanto, la videoj pri Esperanta gazetaro ne povintus okazi sen volontulado en la CO. Ni ankaŭ memoru, ke niaj volontuloj helpas ne nur dum, sed ankaŭ post siaj volontuladoj kaj la volontuleblo helpas niajn aktivulojn pli forte ekkoni unu la alian kaj krei longdaŭrajn kunlaborojn. Tiuj efikoj, kvankam ne mezureblaj, tre gravas por la bonfarto de niaj Asocio kaj movado.

Ne ĉiuj antaŭaj direktoroj havis perfektajn rilatojn kun la Estraro kaj kun la Prezidanto de UEA. Kiun sperton vi havas?

Kiam mi estis elektita al mia posteno, unu el la kernaj petoj flanke de la Estraro estis labori por Estrara-oficista teameco. Mi disponeblas por regulaj kunvenoj kaj kunlaboroj kun estraranoj, kaj tre ĝojas pro la disponeblo de estraranoj por tio: mi vidas pozitivan efikon al la laboroj en tiuj kampoj. Ni ja ĉiuj laboras por la samaj celoj, havante malsimilajn spertojn, do respekta kunlaboro povas doni tre valorajn fruktojn.

Nun venas kelkaj demandoj, kiujn oni povas vidi en popularaj retdiskutoj. La unua el ili estas pri TEJO, laŭ kies prezidanto Michael Boris Mandirola (intertempe eksprezidantiĝinta) ĝuste vi kaŭzis “per pretekstaj blokadoj kaj prokrastoj” malkonsentojn inter TEJO kaj UEA. Kiel la afero aspektas el via vidpunkto?

Estas absurda aserto.

La dua diskutata afero estas la Jarlibro de UEA por 2017. Kiel povis okazi, ke ĉi tiu utiliga referencilo kun pli ol centjara historio enhavas tro malnovajn informojn? Ekzemple, ni ekscias, ke en 2017 la Akademion de Esperanto prezidas prof Kiselman (li eksprezidantiĝis kaj eksakademianiĝis en decembro 2015) kaj ke en 2017 L. L. Zamenhof estas membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (aŭ ke prof. Reinhard Selten de 1930 ĝis 2016 estis Honora Prezidanto de UEA – ili estas en la sama listo, p. 22)?

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



Gaja estis la celebrado de la 110a datreveno de la unua esperantista societo en Rijeka kaj Kroatio (vd. p. 32-33), kadre de kiu estis disdonitaj diplomoj al aktivuloj de la societo. Sur la foto: Boris Di Costanzo donas diplomon al Vjekoslav Morankić, kiu samtempe enmanigas diplomon al Boris. (Foto el http://www.esperanto.hr/ri110_fotoj2.htm)

Ĉu pli gravas la dua aŭ la unua kongresa parolado de Zamenhof? Pri Itala Esperanto-Federacio kaj la homaj rajtoj

Ĉiuj en la Esperanto-komunumo scias, ke en Bulonjo-ĉe-Marŝo renkontiĝis “ne angloj kun francoj ... sed homoj kun homoj” kaj ankaŭ ke tra la kongresa salono flugis misteraj fantomoj, kiujn ne eblis vidi per la okuloj sed nur per la koroj. Alivorte la parolado de Zamenhof en la unua Universala Kongreso de Esperanto estas tre konata. Multe malpli konata estas lia parolado en la dua kongreso en Ĝenevo la postan jaron. Sed mi kredas, ke ĝi devus esti pli studata. Tie Zamenhof parolis pri tiuj “abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dismetataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj”. Vere malmulto ŝanĝiĝis en la politika vivo en la lasta jarcento, kaj se oni atentis pri Zamenhof, oni scias je kiu flanko oni staras ankaŭ nun.



Tie li ankaŭ diris: «Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne ... forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: “Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!”» Kaj tio estis la enkonduko al la klarigo pri tio, kio estas la interna ideo.

En la nuna tempo okazas, ke la celoj de praktika utileco ŝajnas superregi en nia movado, kaj neniu plu kuraĝas paroli pri la idealoj, kiuj igas nin agi. Eĉ la ideo de la junularo estas avangarda, kiel ĉiam, sed nur en la direkto “Esperanto estas la plej bona ilo por bierumi kune en trinkejo.” Ĉu hazarde, ke nur en Italujo mi aŭdis kontraŭstaron je tio, kaj akuzon al la gejunuloj pri perdo de la direkto, kiam ili insistas pri biero kaj ne pri la idealoj de Zamenhof kaj homaj rajtoj?

Se al tio aldoniĝas, ke Italujo estas stranga lando, vi scios, kial la Itala Esperanto-Federacio ricevis premion pri homaj rajtoj. Italujo estas stranga lando. Neniu kredas je io aŭ alivorte ĉiuj kredas je “dubismo”, kiu de la tempoj de la falo de la Roma Imperio instruis: “Neniam vere kredu je tiuj, kiuj parolas bele en la literatura lingvo”. Pro tio oni ne kredas je la mesaĝoj de la papo, de la usona imperio, de Putin aŭ de estroj de la Eŭropa Unio. Eĉ la plej konvinkitaj kredantoj havas dubon en sia kapo.

Pro tio la agado de Itala Esperanto-Federacio restas ne influita de la novaj modoj kaj restas ankrita je la tradiciaj esperantistaj valoroj. Ĉi tiuj valoroj instruas, ke Esperanto estas io por plibonigi la mondon kaj certigi la rajtojn, almenaŭ la lingvajn homajn rajtojn de ĉiuj homoj. Ne hazarde en tiu dua parolado citita Zamenhof parolis pri tiuj, kiuj batalas por “la rajto de homo”, duonan jarcenton pri frue ol Unuiĝintaj Nacioj.

Ĉi tiuj ideoj en la itala Esperantujo elŝprucas el ĉiuj publikaĵoj, kunvenoj, sciencaj kunvenoj, renkontiĝoj de lokaj grupoj, ktp. Ili tiom elŝprucas, ke ankaŭ neesperantistoj en la fino rimarkis ilin. Tiel okazis, kiel en la fabeloj, ke en iu bela tago oni decidis doni al Itala Esperanto-Federacio premion pri homaj rajtoj. La preciza nomo de la premio estas “Premio Italujo Homaj Rajtoj”. Ĝin starigis la itala sekcio de Amnestio Internacia kunlabore kun la asocio “Internacia Libera Gazetaro – FLIP”, dediĉita al la memoro de la eksa vicprezidanto de FLIP, Antonio Russo. La premio ne havas monan flankon, kaj ĝi ĉefe konsistas el diplomo kaj pentraĵo, kiun ricevis dum ceremonio en Romo la prezidantino de Itala Esperanto-Federacio, Michela Lipari.

La motivoj de la premio aludas al la statutaj celoj de Itala Esperanto-Federacio, kiu, inspirite de la idealoj de Esperanto, aranĝas solidarecajn iniciatojn, kiuj celas promocii pli profundan kulturen integriĝon inter homoj kaj popoloj kun malsamaj lingvoj. Krome la motiva teksto aludas je la partopreno al la kampanjoj de UEA por subteni viktimojn de naturaj aŭ militaj katastrofoj en la mondo, kaj al partopreno en la kampanjo “Oriento-Okcidento” de Unesko.

Apartan laŭdan mencion ricevis la nuna prezidantino de IEF, Michela Lipari. La ceremonio okazis en Romo la 15an de oktobro 2017.

Renato Corsetti

La Esperanto-urbo daŭre vigla

Komence de julio ni havis nian **12an Someran Arbaran Lernejon** (SALO) kun gelernantoj el Herzberg am Harz kaj la pollanda ĝemelurbo Góra. Zsófia Kóródy kune kun Michaela Stegamier kaj du instruistinoj el Góra gvidis la staĝadon. Krom antaŭtagmezaj lecionoj okazis ekskursoj, migradoj en la Harz-montaro, ktp. Je la fino de la semajno oni prezentis kune kun Sarah Hoffmann (komisiito de la urbo por junulara laboro) “nigramagian vesperon” en la kulturdomo en Sieber. Aperis nia urbestro Lutz Peters por rigardi la teatran spektaklon.

Meze de julio ni ofertis dusemajnajn **intensajn lingvajn kursojn** por komencantoj kaj progresantoj sub la gvido de Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar. La lernoritmon ni adaptis al la bezonoj kaj kapabloj de la partoprenantoj. La lingvoekzercado plenumiĝis dum la tuta tago en realaj vivsituacioj. La lernado okazis en malgrandaj grupoj, lernemuloj ricevis ankaŭ individuajn helpon. La konversacia rondo pritraktis aktualajn politikajn, ekonomiajn, sciencajn temojn. Unu el la memorindaj prelegoj estis de Ariadna el Kubo pri tiu lando kaj pri la tiea Esperanto-movado. Ĝin ni organizis en la urba biblioteko kiel kulturvesperon ankaŭ por la loka publiko.

Danke al la belega somervetero ni povis instrui Esperanton subĉiele en la bela Esperanto-ĝardeno. La antaŭtagmezajn lecionojn sekvis posttagmezaj ekskursoj. Ankaŭ migradoj kaj sportumado ne mankis. Vespere ni havis komunajn programojn: rostadfeston kaj gulaŝfeston kun granda kaldrono en la ĝardeno. Vespere ni komune kantis kaj tamtamis. Regis bonega etoso. Samideano Metodi el Bulgario zorgis pri bonetosa muzikumado per diversaj muzikinstrumentoj.

Kune kun la kursanoj, klubanoj, geamikoj kaj vizitantoj ni festis la **11-jaran jubileon de “Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo** en la Esperanto-ĝardeno de Interkultura Centro Herzberg.

Somere kaj aŭtune ofte venis al la Esperanto-Centro gastoj el Germanio kaj aliaj landoj. Al ili ni prezentis nian agadon kaj la bibliotekon, arkivon, kies ordigado daŭre evoluas dank’ al foj-fojaj helpantoj. Ankaŭ **en la urba biblioteko** okazis ŝanĝoj: ni devis movi la librojn kaj gazetojn de la Esperanto-sekcio sur alian bretaron. Danke al projekto kaj konsilado de la universitato Hildesheim ni ricevis pli konvenan lokon por la libroj, kiuj okupas 50-metran bretaron. La Esperanto-materialo estas legebla aŭ pruntebla. Ĝojiga novaĵo estas ankaŭ, ke konata germana esperantisto aĉetis grandan domon proksime al la urba biblioteko en la urbocentro.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Novosibirsko: La dua Lingva Festivalo

Lingva Festivalo, brila ideo de esperantistoj, vagas tra la mondo kaj kunigas popolojn. La siberia urbo Novosibirsko danke al la urba Esperanto-klubo en 2016 aliĝis al ĉi tiu movado. Unu jaron poste, la 14an de oktobro 2017 okazis la dua festivalo.

Ĉi-foje estis prezentitaj 17 lingvoj. Al la festivalo venis lektoroj el la urba internacia literatura klubo, el la nacia tatara centro kaj el kelkaj centroj de eŭropaj lingvoj. La venintaj interesiĝantoj pri lingvoj povis viziti kvin prelegojn, kaj ĉiufoje ili elektis el ses diversaj programeroj. En la granda halo, inter la prelegoj oni povis rigardi librojn en diversaj lingvoj, fotiĝi en naciaj ĉapeloj kaj trinki teon.

Esperanto estis digne prezentita dum la festivalo. Sergej Borisoviĉ Pokrovskij, direktoro de la sekcio "Gramatiko" de la Akademio de Esperanto, rakontis pri la lingvo kaj ĝia historio. Stanislav Kacko, kiu dum unu jaro partoprenas en Poŝtkruciĝo, montris multajn bildkartojn el diversaj urboj de la mondo. Sergej Zajnutdinov, junulo ĵus fininta kurson de Esperanto, rakontis pri sia sperto en la Somera Esperanto-Studado en Slovakio. Daria Arbekova kantis Esperanto-kanton kaj rakontis pri sia partopreno en la 102a Universala Kongreso en Seulo.

Ankaŭ mi prezentis la lingvon kaj reklamis la kurson de Esperanto, kaj tuj post la festivalo la nova kurso estis lanĉita. Al la unua leciono venis naŭ personoj. Do, mi povas diri ke la festivalo estis fruktodona!

Katerina Arbekova





Aleksandr Blinov (Foto: Viktor Ĉugarov)

LF en Ĉeboksaro: Malpli amasa ol antaŭe

La 22an de oktobro en la Ĉuvaŝa ŝtata pedagogia universitato okazis la 22a Lingva Festivalo. La tuta programo de la festivalo pasis en kvar blokoj po 45 minutoj. Estis anoncitaj 44 programeroj, el kiuj kelkaj ne okazis pro neveno de la prezentantoj. Se kalkuli lingvojn, da tiuj estis prezentitaj nur 28. Venis ĉ. 200 gastoj.

La fama festivalo en Ĉeboksari, iam okazanta dum la tuta semajno kaj brakumanta kelkajn ĉeboksarajn altlernejojn kaj regionajn mezlernejojn, kaj dutaga en Ĉeboksari mem, iam kolektanta ĝis mil aŭ eĉ pli da gastoj, salutata de ambasadoroj, vizitata de eksterlandaj esperantistoj prezentantaj siajn lingvojn, – ĉi tiu fama festivalo de jaro al jaro ŝrumpas. Estas multaj objektivaj kialoj, sed nur unu ni menciui. La atento de Aleksandr Blinov – la iniciatinto de la festivalo kaj dum pluraj jaroj ĝia ĉefa motoro kaj prizorganto – pli kaj pli transŝaltiĝas al la problemoj de la defendo de la ĉuvaŝa lingvo kaj kulturo, kiuj pli kaj pli akriĝas.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj Humphrey Tonkin 17 sep prelegis ĉe la Tradukaj Servoj de UN pri "La Graveco de Lingvoj en la Tagordo de UN". (ESF)

19 okt en la kanalo *Educativo 1* de la Kuba Nacia Televido kadre de la populara vespera programo "Skribu kaj Legu", en kiu fakuloj provas ĉiumerkrede diveni tri elstarajn figurojn aŭ temojn je tutmonda nivelo (artistoj, politikistoj, historiaj okazaĵoj k. s.) unu el la tri divenendaj personoj estis Zamenhof; post la sukcesa diveno oni rakontis pri Zamenhof k Eo k pri la omaĝoj okaze de la Zamenhof-Jaro. La informoj estis provizitaj de Kuba E-Asocio. (Landa Agado)

16 okt 2017 en la Tel-Aviva E-Klubo la reĝisoro Zaki Shiff prezentis premieran projekcion de gustuma prezentaĵo (angle: *trailer*) de sia filmo pri Zamenhof. (Amri Wandel)

Kadre de la internacia forumo "Rusio kaj Iberameriko en tutmondiĝanta mondo: historio kaj nuntempo" (2–4 okt 2017, Sankt-Peterburgo) okazis ronda tablo "Esperanto, kiel ponto inter Rusio k Latin-Ameriko" en kiu prelegis Mikaelo Ĉertilov, Dmitrij Ŝevĉenko k Anna Striganova. (Landa Agado).

7 okt 2017 Annie Grente, kiu laboras en norda Grekio kiel voluntulo kun rifuĝintoj el diversaj lokoj, instruante la anglan, germanan k grekan lingvojn, aranĝis prezentadon de Eo en tendaro por rifuĝintoj; kelkaj patroprenintoj petis E-lernolibron en la araba. (Landa Agado)

E-istino Ljudmila Novak el la partio Nova Slovenio estis unu el la naŭ kandidatoj por la nova prezidenteco de Slovenio; en la baloto, okazinta 22 okt, ŝi okupis la kvaran lokon kun 7,15% de la donitaj voĉoj. (I. B.)

UEA aĉetis akciojn de la poŝtelefona programo *Amikumu*, kiu antaŭ nelonge iĝis multlingva, por dek mil eŭroj. (Libera Folio)

Sukcesis la kampanjo de Brazila E-Ligo por apogi la eventon Poliglota en Fortalezo per sendo de 150 ekz. de la kurso *Esperanto para Principiantes* k de la broŝuro *Descubra o Esperanto*; oni kolektis donacojn por 181 kompletoj. (BEL Informas)

Danke al la Centro por Esplorado kaj Diskonigo pri Ĉina Kulturo de la Zaohuang-a Universitato la ĉina klasika libro *Mozi* estas lukse eldonita en la ĉina lingvo k Eo de la eldonejo Xueyuan; la libro estas tradukita de prof. Sasaki Teruhiro, eksprezidanto de KAEM. (El Popola Ĉinio)

Petras Čeliauskas finis la kompilon k enpaĝigadon de la ĝis nun la plej ampleksa litova-Ea vortaro (ĉ. 45 mil vortoj sur 800 paĝoj), kompilita surbaze de la plej granda norma vortaro de la nuntempa litova lingvo *Dabartinės lietuvių kalbos žodynas*; Litova E-Asocio nun serĉas monon por eldoni la vortaron en 2018. (Povilas Jegorovas)

Je 31 okt 2017 al la 103a Universala Kongreso de Eo, okazonta venont-somere en Lisbono aliĝis 226 personoj el 43 landoj; plejmulte el Brazilo 24, Germanio 19, Japanio 17, Francio k Portugalio 16, Usono 12, Pollando 10. (uea.org)

Tribuno



Ankaŭ en Esperanto oni jam povas uzi, kvankam ankoraŭ ne je ĉiuj ebloj, la retejon Scratch, kiu estas kreita, por ke infanoj (reale ne nur infanoj, sed ankaŭ plenkreskuloj) povu per amuza maniero lerni la bazon de la programado. Legu pli en la sekva paĝo.

Scratch – programista platformo (ne nur) por infanoj

Ĉu programado povas esti amuza kaj alloga eĉ por infanoj? Fakte jes! Krome, eblas lerni ĝin eĉ en Esperanto!

Pluraj talentitaj homoj de la fama Masaĉuseca Instituto de Teknologio (MIT) demandis sin: “Kiel per amuza kaj luda formo instrui al infanoj (kaj ne nepre nur al ili, samo funkcios al plenkreskuloj) programadon?” Sekve ekestis la projekto “Scratch”, kiu volas plenumi ĝustecon – ludeme instrui al homoj bazojn de programado, faciligi la procezon kaj vekti kreemon ĉe la uzantoj. La reta platformo nuntempe funkcias jam en pli ol 80 lingvoj, inkluzive Esperanton! (En ĝi ne estas tradukita ĉio – ĉar temas pri tre multaj tekstoj, sed ekzistas la bazo por uzi la retejon plene en Esperanto).

La retejon do eblas elkore rekomendi al ĉiuj, kiuj emas lerni programi, ĉefe al infanoj, sed ankaŭ al kreemaj homoj, kiuj ne nepre volas lerni programadon, sed pere de ĉi-retejo (sistemo) emas utiligi sian kreeman potencialon – en la programo eblas krei vere diversajn kaj diversspecajn aferojn – poŝtkartojn, komputilajn ludojn, videetojn, animaĵojn, kvizojn, kursojn ktp. (Troveblas jam pluraj Esperanto-kursoj en la retejo.) La uzeblo varias ĉefe laŭ viaj kapabloj kaj bezonoj.

Certe indus ankaŭ helpi fintraduki la retejon al Esperanto, temas pri ege utila projekto por nia movado. La retejo de Scratch estas: <https://scratch.mit.edu>; elekti/ŝanĝi lingvon oni povas sube en la retejo.

Ankaŭ tiun ĉi retejon prezentis E@I la 20an de oktobro al lernantoj en Partizánske (sidejo de E@I en Slovakio) okaze de la tuteŭropa aktivado “Meet and Code” (Ni renkontiĝu por programi), kiu okazas dum la “Eŭropa semajno de programado”. Ĉi tiu iniciato celas pretigi infanojn kaj gejunulojn por la bezonoj de cifereca mondo de la estonteco, subtenante ĉiajn formojn de programado.

E@I pretigis du programerojn. La slovakia esperantisto kaj profesia programisto Viliam Búr prezentis al lernantoj kaj studentoj en Partizánske sian profesion. Unue en gimnazio li parolis pri la nuna stato en la programista profesio, pri la programlingvoj, pri laboro, avantaĝoj kaj malavantaĝoj de tiu ĉi nuntempe ege bezonata profesio. Poste li kune kun Peter Baláž prezentis “Scratch”-on al infanoj de bazlernejo en la urbo. Dum du horoj ili vere kaptiĝis kaj kapablis fari bazajn komputilajn ludojn. Temas pri ege potenca ilo, certe uzinda ankaŭ en la Esperanto-movado!

Peter Baláž

E@I-kunordiganto

SCRATCH



ESF bezonas vian subtenon

Kion faris Esperantic Studies Foundation (ESF) en 2017? Jen kelkaj ekzemploj.

- Ĝisdatigo de la reta korpuso de Esperanto, Tekstaro.com, per novaj tekstoj kaj novaj funkcioj
- Revivigo de la bulteno *Informilo por Interlingvistoj*; lanĉo de nova anglalingva bulteno, *Information for Interlinguists*
- Okazigo de serio de prelegoj pri Esperanto-rilataj temoj en Novjorko
- Premio de la Simfonio *Esperanto* de David Gaines, prezentita de la Bjali-stoka Simfonia Orkestro honore al la Zamenhofa Jaro
- Somera seminario pri lingvoplanado kaj lingvopolitiko en la Universitato de Kostariko

ESF ankaŭ havas grandajn planojn por la venonta jaro. Legu!

En septembro 2018, ESF festos sian 50-jariĝon. Fondita en 1968, kun tre limigitaj rimedoj, ESF iom post iom kreis kapitalon, kiu permesis subteni projektojn, kiuj helpis profesiigi Esperantujon kaj konsciigi universitatojn kaj funkciulojn pri maljusta komunikado. ESF ankaŭ kreis retejojn, kiuj permesis instrui nian lingvon senpage al homoj tra la mondo, ankaŭ en lokoj, kie ne ekzistas Esperanto-asocioj aŭ kursoj.

Dum la jubilea jaro ni retrorigardos, kion ESF atingis dum la duonjarcento de sia ekzisto: ni parolos pri multaj projektoj, kiujn ESF kreis aŭ subtenis, ekzemple, pri Lernu.net kaj Edukado.net: la du plej grandaj projektoj subtenataj de ESF. Kreitaj antaŭ pli ol 15 jaroj, tiuj du retejoj helpis fari la konekton inter la “fizika” Movado kaj la rapide kreskanta reta Esperanta komunumo. Ni parolos, kompreneble, pri NASK, unu el la plej grandaj Esperanto-aktivaĵoj en Ameriko: Nord-Amerika Somera Esperanto-kursaro kiu, cetere, 50-jariĝos en 2019, nur unu jaron post la 50-jariĝo de ESF (ĝi estis aparte sukcesa ĉi-jare, kun 58 partoprenintoj). Ankaŭ ni parolos pri multaj, ne tiel konataj sed gravaj, projektoj kiujn ESF subtenis. Surbaze de ili, ni esperas lanĉi novajn agadojn por fortigi universitatan instruadon de Esperanto, por esplori pri la potencialoj de la Esperanto-komunumo, por fortigi la lingvonivelon de esperantistoj, kaj por disvastigi informojn pri Esperanto, interlingvistiko, kaj lingvaj demandoj, precipe inter fakuloj.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkivo



Antaŭ 80 jaroj, la 1an de novembro 1937 en Varsovio naskiĝis Roman Dobrzyński, televida ĵurnalista kaj esperantisto, la plej konata aŭtoro de dokumentaj filmoj en/pri Esperanto. Ni gratulas nian eminentan samideanon okaze de la 80-jariĝo kaj deziras al li sanon kaj pliajn kreajn sukcesojn!

La romano pri Romano



de Roman Dobrzyński

La redaktoro de *La Ondo* elpensis la supran titolon, sed rekompence postulis, ke mi kroĉu al ĝi mian esperantistan biografion, pli ampleksan ol li kun sia edzino Halina prezentis en la baldaŭ aperonta leksikono *Nia Diligenta Kolegaro*. En tiu ĉi maŭzolea verko mi estis fiksita, laŭalfabete, sub la litero “D”. Legante la provpresaĵon de la “D-ĉapitro”, mi konstatis, ke ĝi estas tombejo de “D-uloj”, inter kiuj mi vagas kiel sola vivanta fantomo. Ĉu pro tio mi trafis al la libro *Nia diligenta kolegaro*?

Kial mi iĝis esperantisto? Tiun ĉi oftan demandon mi lernis diversmaniere respondi. La plej celtrafa ŝajnas la teorio de prof. Humphrey Tonkin: “Esperantisto oni naskiĝas”. Multaj homoj ne scias, ke ili naskiĝis esperantistoj. Por malkovri la esperantistecon en si mem oni devas trafi fekundan grundon, alivorte – ĝustan propagandon. Tiel okazis kun mi.

En la malnova kvartalo de Varsovio, ĵus postmilitre rekonstruata, mi ekvidis sur la muro sageton kun la belsona vorto “Esperanto”. Kiel sperta skolto mi senhezite sekvis tiun ĉi sagon, kaj eniris kelan ejon, en kiu sidis tri maljunuloj: Tadeusz Pleskaczyński, Stanisław Rudnicki, Bronisław Tuszkievicz. Ili pensis, ke mi perdiĝis en la ruinigita urbo kaj bezonas helpon, sed mi kuraĝe demandis: “Kio estas Esperanto?” La maljunuloj tiel fervore klarigis, konvinkis, varbis, ke mi atentis momenton por fuĝi. Sed tio evidentiĝis ebla, nur postkiam ili ricevis mian adreson. La manskribita letero kun informo pri la dato kaj kosto de la kurso de Esperanto venis post kelkaj monatoj. Mi demandis la patron, ĉu valoras lerni la strangan lingvon. Li respondis: “Kara filo, lernu. Ĉiu scio povas montriĝi utila en la vivo.”

Estis tiam la jaro 1955. Tri jardekojn poste mi vizitis la unuan fojon la esperantistan edukejon en Brazilo “Bona Espero”. En ĝia riĉa biblioteko mi trovis interesan libron de Ramatis. *La misio de Esperanto (pere de la psikografo Hercilio Maes)* (Limeira: Editora do Conhesimiento, 2000), diktita transmonde en la portugala



UK-44. Roman Dobrzyński kabaredas en *Verda Simio* (Varsovio, 1957)

la transmondaj fortoj preparas min por alia jubilea aranĝo.

50 jarojn post mia naskiĝo okazis en Varsovio la 72a Universala Kongreso de Esperanto omaĝe al la 100a naskiĝjaro de la lingvo internacia mem. Tiam mi estis prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, kaj laŭ interna imperativo, mi devis kunorganizi la jubileon. Alia kunorganizanto, pli grava ol mi, estis, la jam menciita prof. Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA. Kvankam malsame gravaj, ni same suferis la plej tumultan kongreson en la historio de la Esperanto-movado. Partoprenis ĝin preskaŭ ses mil esperantistoj. Tiom granda homamaso kaŭzis monton da problemoj. Dum ni, ĉu kune ĉu aparte, kurante de unu kunveno al alia tra la vastega spaco de la kongresejo, senĉese aŭdis dramajn alvokojn: "Sinjoro prezidanto, sinjoro prezidanto!" Ĉiam ripetiĝis plendoj pri problemoj malfacile aŭ tute nesolveblaj. Jen denova (centa?) alvoko: "Sinjoro prezidanto!" Mi haltas senespere antaŭ maljuna kongresanino: "Sinjoro prezidanto! Helpu min trovi necesejon". Tiun ĉi prezidantan taskon mi sukcese plenumis.

Alian fojon mi helpis d-ron Ludoviko Zaleski-Zamenhof trapenetri la densan samideanaron. Ĉiuj volis foti sin kun la nepo de la Majstro. Foje sinjorino,

lingvo kaj esperantigita de Giuseppe Grattapaglia. En ĉi tiu libro oni skribis, ke multaj spiritoj, inkluzive de Zamenhof mem, estis en la ĉielo antaŭ sia enkarniĝo preparataj por Esperanto kaj ĝia interna ideo. Tiu ĉi revelacio komprenigis al mi du kialojn de mia naskiĝo: la jaro 1937 kaj la loko – Varsovio. Ĝuste tiam kaj tie okazis la 29a Universala Kongreso de Esperanto, dum kiu oni celebris la Oran Jubileon de la Zamenhofa lingvo. Mia naskiĝo ne povis esti blinda hazardo, sed celvida projekto. Ja en 1959 gastis en Varsovio la 44a Universala Kongreso de Esperanto okaze de la 100a naskiĝdatreveno de Ludoviko Zamenhof. Mi partoprenis ĝin kiel aktivulo de Pola Esperanto-Junularo, sed ankaŭ kontribuis ĝian artan programon kun la kabaredo *Verda Simio*. (Aparte furo-ris skeĉo pri la unua en la mondo Esperanta necesejo.) Kiel helpanto mi ne konsciis, ke la



UK-72. Sur la podio de la plej granda kongreso en la historio de Esperanto: Roman Malinowski (Alta Protektanto de la kongreso, prezidanto de la Pollanda Parlamento), Humphrey Tonkin (prezidanto de UEA) kaj Roman Dobrzyński (prezidanto de PEA). (Varsovio, 1987)

ornamita per verdaj steloj, blokis la trapason kaj demandis: “Sinjoro, ĉu vi estas la Nepo de Zamenhof?” Li, jam laca pro daŭra fotado, kategorie neis sian nepcon. Sed ŝi ne cedis. “Ĉu ne estis vi, kiu dum la inaŭguro sidis sur la podio kiel la Nepo de Zamenhof? Jes estis mi... Sed mi nur ludis la rolon de la Nepo, pro kio la direktoro de UEA, Simo Milojević pagis al mi 2000 dolarojn”. La samideanino malkredeme retiriĝis, sed la Nep-edzino, Juliette plenkrede demandis: “Kie vi kaŝis tiujn du mil dolarojn?”

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



La novelo *Okazaĵo ĉe la ponto super la rivereto Strigo* (1890) verkita antaŭ 125 jaroj de Ambrose Bierce, naskiĝinta antaŭ 175 jaroj en 1842 kaj malaperinta fine de 1913 aŭ komence de 1914, estas unu el la klasikaĵoj de la usona literaturo, konata tutmonde danke al filmaj adaptoj, radiospektakloj kaj tradukoj al dekoj da lingvoj, al kiuj – danke al *Liro-2016* – nun apartenas ankaŭ Esperanto. (Supre: kadro el filmo, prezentita en 1964)

Okazaĵo ĉe la ponto super la rivereto Strigo



de Ambrose Bierce

I

Viro staris sur fervoja ponto en norda Alabamo, rigardante malsupren en la rapidan akvon dudek futojn sube. La manoj de la viro estis malantaŭ lia dorso, kun la pojnoj ligitaj per ŝnureto. Ŝnuro strikte ĉirkaŭis lian kolon. Ĝi estis fiksita al fortika transversa trabo super lia kapo, kaj la loza parto pendis ĝis la nivelo de liaj genuoj. Luj nefiksitaj tabuloj antaŭe metitaj sur la ŝpalojn apogantaj la relojn de la fervojo donis starejon por li kaj liaj ekzekutistoj – du simplaj soldatoj de la Federa armeo, direktata de serĝento, kiu en civila vivo eble estis deputita ŝerifo. Iomete for sur la sama dumtempa starejo estis armita oficiro en la uniformo de sia rango. Li estis kapitano. Po unu sentinelo ĉe ĉiu fino de la ponto staris kun sia fusilo en la pozicio nomata “subteno”, tio estas vertikala antaŭ la maldekstra ŝultro, la ĉano sur la antaŭbrako etendita transverse antaŭ la brusto – formala kaj nenatura pozicio deviganta vertikalan sintenadon de la korpo. Verŝajne ne estis la devo de tiuj du viroj scii, kio okazas ĉe la mezo de la ponto; ili simple blokis la du finojn de la piedira tabularo, kiu laŭlongis ĝin.

Post unu el la sentineloj neniu videblis; la fervojo etendiĝis rekte en arbaron cent jardojn kaj poste, kurbiĝante, ne plu videblis. Sendube antaŭposteno situis poste. La alia bordo de la rivereto estis senobstrukca – milda deklivo kies kreston kovris palisaro el vertikalaj arbotrunkoj, kun fendetoj por fusiloj kaj unu embrazuro, tra kiu elstaris la tubo de latuna kanono superreganta la ponton. Meze de la deklivo inter la ponto kaj fortikaĵo estis la spektantoj – unu infanteria kompanio en linio, en “parada ripozo”, kun la kolboj de siaj fusiloj sur la tero, la tuboj kliniĝantaj iomete malantaŭen ĉe la dekstra ŝultro, la manoj transverse sur la kulaso. Leŭtenanto staris dekstre de la linio kun la pinto de sia sabro sur la tero kaj sia maldekstra mano sur la dekstra. Krom la kvaropo ĉe la centro de la ponto, neniu moviĝis. La kompanio alfrontis la ponton, rigardante ŝtonece, senmove. La sentineloj alfrontantaj la riverbordojn, povus esti statuoj por ornami la ponton. La kapitano staris kun krucitaj brakoj, silente, observante siajn subulojn labori, sed farante nenion geston. Morto estas moŝto,

kiu venanta antaŭanoncite estu akceptita kun formala manifesto de respekto, eĉ de tiuj, kiuj plej bone konas ĝin. En la kodo de militista etiketo, silento kaj senmoveco estas formoj de omaĝo.

La viro engaĝita en la pendumon verŝajne havis ĉirkaŭ tridek kvin jarojn. Li estis civilulo, se taksu laŭ lia vestaĵo, kiu estis plantista. Liaj trajtoj estis bonaj – rekta nazo, firma buŝo, larĝa frunto, de kiu liaj longaj malhelaj haroj estis kombitaj rekte malantaŭen, post liaj oreloj ĝis la kolumo de lia bone tajlorita frako. Li havis lipharojn kaj pintan barbon, sed ne vangoharojn; liaj okuloj estis grandaj kaj malhelgrizaj kun bonkoreco, kiun oni apenaŭ atendus de iu, kies kolo estis ŝnurita. Evidente ne temis pri vulgara murdisto. La ĉioinkluda militista kodo enhavas kondiĉojn por pendumi multajn specojn de homoj, kaj ĝentlemanoj ne estas ekskluditaj.

Fininte la preparadon, la du soldatoj paŝis flanken kaj ĉiu forprenis la tabulon, sur kiu li antaŭe staris. La serĝento turnis sin al la kapitano, salutis, kaj lokis sin tuj malantaŭ tiu oficiro, kiu siavice faris unu paŝon for. Tiuj movoj lasis la kondamniton kaj la serĝenton starantaj sur la du ekstretoj de la sama tabulo, kiu etendiĝis transverse sur tri ŝpaloj de la ponto. La ekstremo, sur kiu la civilulo staris, nur preskaŭ atingis kvaran. Ĉi tiu tabulo antaŭe restis stabila pro la pezo de la kapitano; nun ĝi restis pro tiu de la serĝento. Je signalo de la unua, la dua paŝos flanken, la tabulo kliniĝos, kaj la kondamnito falos inter du ŝpalojn. Li devis agnoski la aranĝon simpla kaj efika. Lia vizaĝo ne estis kovrita, nek liaj okuloj. Li rigardis dum momento sian “necertan starejon”, tiam lasis sian rigardon vagi al la kirlanta akvo de la rivereto fluanta furioze sub liaj piedoj. Peco de dancanta drivoligno kaptis lian atenton, kaj liaj okuloj sekvis ĝin flosantan laŭflue. Kiom malrapide ĝi ŝajnis iri! Kia malvigla rivereto!

Li fermis siajn okulojn por fiksi siajn lastajn pensojn sur sian edzinon kaj infanojn. La akvo orita de la frua suno, la melankoliaj nebuloj ĉe la bordoj iom for laŭ la rivereto, la fortikaĵo, la soldatoj, la peco de drivoligno – ĉiuj distris lin. Kaj nun li ekkonstatis novan ĝenaĵon. Tra la penso pri liaj karuloj batis sono, kiun li povis nek ignori nek kompreni, akra, klara, metala perkutado kiel la frapado de forĝista martelo kontraŭ amboson; ĝi havis tian saman sonorecon. Li scivolis, kio ĝi estas, kaj ĉu nemezurable malproksime aŭ proksime – ĝi ŝajnis ambaŭ. Ĝia ripetigado estis regula, sed malrapida kiel funebra sonorado. Li atendis ĉiun novan frapon senpacience kaj – li ne sciis kial – time. La intervaloj de silento fariĝis ĉiam pli longaj; la prokrastoj fariĝis frenezigaj. Kun sia pliĝanta malofteco, la sonoj fariĝis pli fortaj kaj akraj. Ili vundis lian oreilon kiel la piko de tranĉilo; li timis, ke li ŝrikos. Tio, kion li aŭdis, estis la tiktakado de lia horloĝo.

Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Artisto en ŝanĝiganta mondo

Malfacilas esti kandidato. Kutime la favoratoj por la Nobel-premio pri literaturo en la profesiaj vetlistoj gajnas nenion. Alternative oni povas atribui la premion al si mem (aŭ almenaŭ sian fikcian alian “mi”), kiel faris John Updike en *Bech en premeĝo* (Bech at Bay). Ankaŭ la nuntempa ada kandidato Haruko Murakami faris jam ironian referencon al la fama premio. En *Senkolora Tazaki Cukuru kaj liaj jaroj de pilgrimado* li notis, ke junaj talentoj povas gajni nur monon, kiam ili ricevas Nobel-premion “aŭ ion alian”. Notu bone: junaj talentoj! Murakami jam ne bezonas ajnan konfirmon. Ankaŭ ĉi-jara laŭreato enspezas sufiĉe sen manpremo el Stokholmo. Kaj finfine ili eĉ denove trovis verkiston – mirinde post la lastjaraj ekskursoj al marĝenaj distriktoj de la literaturo.



La elekto de Kazuo Işiguro estas laŭ la profesiaj kolegoj ĉe la internaciaj felietoj iom surpriza, tamen bona. Unu el liaj plej avidaj legantoj estas ĝuste Murakami, kiu ĉe la apero de nova libro de Işiguro lasas ĉion por tuj frandi lian novan libron.

Işiguro estas ekzemplo por el- kaj enmigrado sur nia tutmondiĝanta tero. Kiel japandevena verkisto en la angla lingvo li mem spertas la “abismon sub nia iluzia sento de konekto de la mondo” kiel asertis la Nobel-komitato. La verkaro de Işiguro estas plena de imagitaj hejmlandoj. Ni estas multmaniere en konekto kun la mondo. En sia unua verko *Pala vido de montoj* eĉ Japanio estas tiela imago surbaze de filmoj kaj romanoj. Tamen li ne priskribas Japanion kiel “perditan paradizon”.

Probable la plej konata kaj sukcesa romano de Işiguro (ankaŭ pro la fama filma adapto) estas *La Restaĵoj de la tago*. Temas baze pri la tragedio de la homo en la persono de la lojala ĉefservisto Stevens, kiu klopodas konservi sian dignon, sed tamen perdas sian homecon. Stevens decidas esti fidela al sia mastro kaj subpremas la ceterajn tavolojn de siaj emocioj. *La restaĵoj de la tago* tiel temas ankaŭ pri dekondukita idealismo.

Işiguro estas por la publiko relative konata premiito, certe ankaŭ pro tio, ke li verkis originalajn kaj adaptitajn scenarojn por famaj filmoj. Li reverkis sian romanon *Neniam forlasu min* kaj por la granda ekrano kaj por la televido. Tial iuj kritikistoj ja asertis, ke li verkas ne veran literaturon, sed eble nur altnivelajn distrajn romanojn. Eble Işiguro estas unu el la maloftaj verkistoj, kiuj kapablas verki ambicie kaj populare. *Neniam forlasu min* estas unu el la plej glaciaj malutopioj de la lastaj jaroj. Ni renkontiĝas kun grupo da junuloj, kiuj lernis, ke ili estas tre specialaj kaj aliaj ol la ceteraj homoj. Iom post iom ni komprenas, ke iliaj korpoj funkcias kiel stoko

de rezervaj partoj por estontaj transplantadoj. Denove Iŝiguro esploras la homajn kondiĉojn kaj dubojn pri identeco, ĉi-foje en la kostumo de scienc-fikcio.

Esperantoparolantoj ja spertas ĉiutage, ke ni havas diversajn identecojn en diversaj kuntekstoj kaj komunumoj. Ni scias, ke ni estas difinitaj de multaj faktoroj kaj ne de nur unu faktoro. La mondo fariĝas tro komplikita. Pro tio multaj homoj serĉas simplajn respondojn al malsimplaj demandoj. Tial estas bele, ke la Nobel-komitato elektis verkiston, kiu esploras kiom delikata kaj kunmetita estas la homa ekzisto. Bravo, Stokholmo! Gratulon, Kazuo Iŝiguro!


Wolfgang Kirschstein

(Preskaŭ) Monda premiero de *Incubus*

Vendredon, la 13an de oktobro, spite al kiu ajn superstiĉo, estis prezentita kadre de la 38a Kataluna Kongreso de Esperanto en Àger (vd. p. 21), la fantasta filmo *Incubus* en ĝia originala Esperante parolata versio, sed kun Esperantaj subtekstoj en nova bonkvalita eldono. Temas pri vera raraĵo: filmo ne nur originale parolita en Esperanto, sed fakte kun originale Esperanta skripto kaj reĝisorita ankaŭ en la internacia lingvo ... de neesperantista reĝisoro kaj neesperantistaj geaktoroj.

Ĝia monda premiero okazis meze de la 1960aj jaroj en filmfestivalo en San-Francisko (Usono) sed en fuŝe kripla versio, kio malsukcesigis pluan komercan prezenton. Dum la 1970aj jaroj ie-tie en Francio eblis ĝin spekti en certaj francaj kinejoj, kaj poste ĝi malaperis. Ĉiuj kopioj ŝajne perdiĝis kaj la afero forgesiĝis por preskaŭ kvindek jaroj.

Tamen kelkajn monatojn antaŭ la 38a Kataluna Kongreso de Esperanto, la filmamanto Christian Aguilera, animo de la nemovada eldonejo Blue Moon S.L. entreprenis la taskon eldoni DVD-pakaĵon pri la usona televida serio *The Outer Limits* (en la originala anglalingva versio kun hispanlingvaj subtekstoj) kies reĝisoro estis Leslie Stevens. Christian, vera fakulo pri kinoarto, sciis pri la ekzisto de *Incubus* kaj havis la brilan ideon enmeti ĝin kiel aldonan materialon en tiu eldono. Tial li kontaktis kun nia samideano Carles Vela, kiu esperantigis la franclingvajn subtekstojn de la sole disponebla kopio.



Ĝi estas demonstra versio de la 70-paĝa novembro *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Literatura konkurso *Liro*-2017

La redakcio de *La Ondo de Esperanto* denove invitas al la tradicia literatura konkurso *Liro*. Same kiel en la du lastaj jaroj, ankaŭ en 2017 la konkurso havos nur tradukajn branĉojn.

Por *Liro*-2017 estas proponataj du tradukendaj verkoj:

1. Traduko el la angla: *To the Man on the Trail* – novelo de Jack London;

2. Traduko el la rusa: *Obruĉ* – novelo de Fjodor Sologub.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la retejo de *La Ondo de Esperanto*:

<http://esperanto-ondo.ru/Ind-liro.htm>

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Sendu kvar tajpitajn aŭ komputile kompostitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). Oni povas sendi la tekstojn rete (slipoj estu sendataj en apartaj mesaĝoj), al la retadreso sezonoj@yahoo.com.

La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 31a de decembro 2017.

La laŭreatoj (unu en ĉiu branĉo) ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizantoj ĝis la 1a de januaro 2021 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la premiitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike.

La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizantoj en okazo de libroforma eldono. La plej bona traduko de la novelo de Jack London aperos en la antologio de anglalingva literaturo, eldonota de *Sezonoj*.

Bonŝancon!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro*-2017

La jarabono por 2018 kostas nur 15 eŭrojn

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko

La redakcio de “La Ondo de Esperanto” invitas al kunlaboro en la sekcio “Mozaiko” karikaturistojn, humoristojn, kompilantojn de krucenigmoj kaj de aliaj enigmoj.



Sep enigmoj

№1. Pri kio temas: oni ĵetas ĝin, kiam uzas, kaj levas, kiam ĝi ne estas bezonata?

№2. Se civitano faris tion unu fojon dum tago – estas bone, se dufoje – estas krimo.

№3. Kio rezultos, se vi postkuros du kenjanojn?

№4. Divenu, se je la dua horo de nokto neĝas, ĉu oni povas atendi, ke post 96 horoj estos suna vetero?

№5. Kion entrepreni, ke ajna komputilo estu efektive rapida?

№6. Kion oni faru, ke la vortoj ne kontraŭu la agojn?

№7. Ankoraŭ en la antikva tempo okazis ĉi tiu invento. Ĝi permesas al homo rigardi tra murojn. Pri kia invento temas, se oni uzas ĝin ĝis nun?

Bonvolu sendi viajn respondojn retroŝte (sezonoj@kanet.ru, kopie al sezonoj@yahoo.com) antaŭ la 20a de novembro 2017.

Pri lernejoj, instruistoj, lernantoj kaj gepatroj

La edzino de instruisto pri matematiko forpelis lin el punkto A al punkto B.

Instruistino demandas unuaklasanon:

— Kial ci manĝas dum leciono?

— Mi ne volas perdi tempon dum la paŭzo.

— Kiel statas viaj lernejoj aferoj?

— Bonege! Hodiaŭ dum la leciono pri kemio ni lernis voki demonojn...

— Kial ci kuŝaĉas? Ellitiĝu, ci malfruas en la lernejon!

— Mi havas depresion.

— Ĉu depresion? Neeble! Ja por havi depresion oni devas longe kaj bone lerni, multe legi kaj mediti. Elitiĝu, lavu vin kaj kuru lernejen!

— Panjo, ĉu mi morgaŭ faru en mia ĉambro grandan purigadon?

— Ne.

— Panjo, ĉu mi morgaŭ iru al vendejo, aĉetu ĉion kaj kuiru manĝaĵon?

— Ne.

— Panjo, ĉu mi..?

— Ne! Kaj ankoraŭfoje ne! Morgaŭ ci iros al la lernejo.

Plukis kaj tradukis **Kukucapa Niemoskovskaja**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Planedo ne sendas Jarlibron

... per ĉiu unuopa rezigno pri la papera Jarlibro la Asocio ŝparas sendokostojn – kaj same la planedo. (Veronika Poór, 23 aŭg 2017, <https://groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/topics/10390?reverse=1>)

Memorata eĉ sen ko

La esperantistoj ne forgesis Ada Sikorsa, Honoran Membrinon de UEA... (*Esperanto*, 2017, №10, p. 208; rimaris Paweł Fischer-Otowski)

Nia beletra roko, aŭ: Rock it, Edwin

La libron konkludas longa poemo de Edwin de Rock... (Antonio De Salvo, 23 sep 2017, <http://www.bitoteko.it/esperanto-vivo/eo/2017/09/23/armand-su>)

Rapida valorigo

Aliaj similaj fromaĝoj povas nomiĝi (kaj fakte moniĝas) kiel blua fromaĝo (<https://eo.wikipedia.org/wiki/Rokforto>)

Fekul' en Moskvo

Soveta armeo invadis en Afganio ĉar iu en Kremlo kakulis sin je nova Napoleono. Kaj eraris. (Sergei Nossov, 4 okt 1999, <https://groups.google.com/forum/m/#!msg/soc.culture.esperanto/rGixqGQppxl/T8uHmCdfC4sJ>)

Dupont emas pilki ene de EU

Nicolas Dupont-Agnan estas Golisto kaj ne volas tuj foriri el Eŭropo. (Ĵak Le Puil: *La Kuracoservo, La Kancerkliniko*, 2017, №162, p. 4)

Longa eduktempo

... la loka Baza Lernejo numero 1, en kiu de jardekoj lernas la romaaj infanoj. (Murpentraĵo por Avinjo Noncia savanta infanojn dum la milito, 27 jun 2017, <http://pola-retradio.org/novajoj-2>)

Sen feminismo

Mi serĉis invane en la retejo de UEA. (Ileana Schröder, 15 nov 2016, <https://groups.yahoo.com/neo/groups/komitato-de-uea/conversations/messages/9684>)

Bate debate, aŭ: Krimliko kaj punliko?

... en la internacia libro-foiro de Jerusalemo... ni disdonis centojn da fugfolioj, vendis dekojn da libroj, organizis punlikan debaton... (Amri Wandel, Facebook, 15 jun 2017)

Plukis István Ertl

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 750 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: swanzer@esperanto-buchversand.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: G. David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland NZ-0753. Rete: gddewar@ihug.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530. Rete: elna@esperanto-usa.org.

Neniam sendu monon en kovertoj!

103-a Universala Kongreso de Esperanto

Lisbono, 28 julio - 4 aŭgusto 2018

